

*Rio
Esperantista*



ASOCIO ESPERANTISTA
DE RIO-DE-JANEIRO
junio – julio 2014

Kultura Revueto

De



“Kristo de l’ Korkobado - Rio”

OFICIALA ORGANO DE ASOCIO ESPERANTISTA DE RIO-DE-JANEIRO

junio – julio 2014

ASSOCIAÇÃO ESPERANTISTA DO RIO DE JANEIRO

★ Rua Teófilo Otoni, 135 / 302 ★

☎ 2467-4296 – ✉ aerjrj@hotmail.com e www.aerj.org.br

Redaktas: *Paulo Sérgio Viana*

Aranĝas: *Alfredo Araújo*

RIO ESPERANTISTA

VORTOJ DE LA REDAKTORO

Estimataj AERĴ-anoj:

Ĉi tiu estas la lasta numero de nia bulteno, kiu aperas sub la respondeco de ĉi tiu redaktora duopo. Sed ne zorgu – ni ne adiaŭas vin! Vi konstatos, ke ni plu aperos sur la paĝoj de Rio Esperantista, sed kiel simplaj kunlaborantoj, ne kiel redaktoroj.

Jen la klarigo. La Estraro de nia kara asocio kunsidis, diskutis, kaj prave decidis, ke ni devas publikigi pli ampleksan, pli imponan, pli modernan revuon, ne nur modestan bulteneton, kiel dum la lastaj monatoj. Ni tute konsentas. Tio estas natura postulo je la nivelo de la tradicio de ĉi tiu revuo. Nova laborgrupo, sub la gvido de Profesoro Fernando Pitta, post kelkaj monatoj ekrespondecos pri la nova Rio Esperantista. Ĝi verŝajne publikigo ekskluzive en virtuala maniero, kiel moderne okazas je multaj similaj publikaĵoj. Tiel ni povos

montri kaj sendi ĝin al iu ajn instanco – ekzemple al universitatoj, ĵurnaloj kaj aŭtoritatoj – sen la sento pri troa simpleco. Ni devas akcepti, ke la publika opinio ja postulas decajn materialojn, por ke la Esperanta kulturo montriĝu al la mondo kiel io grava kaj atentinda.

Sed atentu! La nova laborgrupo nepre bezonos la partoprenon de la membroj de nia AERĴ. Revuo dece reprezentos la asocion nur se ĝiaj anoj aktive agados. Kiel vi povos helpi? Unue vi devos legi, pripeni kaj reagi al nia revuo, per konstruaj kritikoj. Due, vi devos verki por ĝi, kompreneble. Ni ne forgesu, ke la Esperanta kulturo kreskas kaj diversiĝas ĉiutage, sed tio ne okazas senpene. Ĝi estas laboro de la Esperantista komunumo. Persone, la (de nun eks)redaktoroj proponas sian kunlaboradon al la nova laborgrupo – kaj esprimas nian deziron, ke la nova Rio Esperantista vikle prosperu.

Al la karaj legantoj kaj al la Estraro ni kore dankas pro la bonvolemo, per kiu vi akceptis nian modestan laboron. Kredu: ni plenumis ĝin kun plej sincera intenco helpi al la asocio, al ĝiaj membroj, kaj la afero de Esperanto, entute.

—*P.S.V.*

VORTOJ DE LA ESTRARO

Ni deziras mencii tre sukcesan laboron komencitan de AERĴ. Temas pri “AERJ Itinerante”, kiu estas vizitoj farataj de la estraro de Asocio al grupoj de nia subŝtato. Ni rimarkis ke malmultaj homoj ĉeestis la kulturajn kunvenojn en nia sidejo. Multaj ne partoprenis pro tio, ke ili jam iris la tutan semajnon al la urbocentro, la loko de nia sidejo ne estas proksima al la grupoj, k.a.

Foje, samideanino proponis al ni ke ni vizitu la grupojn de Rio-de-Janeiro por montri ke la Asocio apogas la grupojn, akompanas ilin kaj por alproksimigi tiujn esperantistajn nukleojn al ni, la estraro. Antaŭ la malfacileco de la esperantistaro ĉeesti niajn kulturajn kunvenojn kaj tiu ideo, de la komenco de la jaro, kulturaj kunvenoj kiuj okazus en la sidejo, nun okazas en la grupoj, dum la horo de la ordinaraj lecionoj. Tiel ni atingas la gelernantojn kaj stimulas ilin praktiki Esperanton, ĉar la kunvenoj estas en

Esperanto kaj ni klopodas organizi ilin paroligajn, do ni prezentas agadon paroligan, ne prelegan.

La unua okazis en marto por la esperantistaro de regiono “Leopoldina”, antaŭurbo de Rio, prezentita de la direktoro de faka instruado, Fernando Pita, ĵaŭde, je la 18^a horo, kiam pli ol dek homoj akompanis Pita dum lia prezentado. Aprile okazis en kvartalo “Bangu”, en Esperanto-Grupo Ismael Gomes Braga, sabate vespere, farita de samideano Paulo Carvalho, eksprezidanto de nia Asocio, kiam la gelernantoj kaj vizitantoj debatis pri humura historieto rakontita de li.

Dum monato majo AERĴ vizitis Botafogo Esperanto Nukleo (BEN), merkrede nokte, kiam samideano João Santos kunfratigis la homojn de du kursoj de la suda parto de Rio, per demandoj kaj ludoj, same kiel la lecionoj de Ĉemetodo. La 18^{an} de junio ni vizitis samideanojn de urbo “Volta Redonda”, apogante la kurson de sinjoro Alberto Flores, per laboro de samideano Fernando Pita por la gelernantoj de tiu kurso. En julio ne okazos kunveno sed en aŭgusto ni vizitos urbon “Niterói” por nova kunfratiĝo en Niteroj Esperanto Klubo (NITEK).

Ni deziras reliefigi, ke AERĴ celas prezenti kulturajn kunvenojn por gelernantoj de kursoj en Rio-

de-Ĵanejro, en la lecionaj tagoj de ĉiu grupo, por alproksimigi la Asocion al la movado kaj stimuli la praktikadon de la lingvo inter ko-

mencantoj. Ĝis nun, oni taksas la laboron bona kaj fruktodona.

KUBA ESPERANTISTO SKRIBAS AL LA BRAZILA ESPERANTISTARO POR DANKI

De simpatia kuba Esperantisto Juan Carlos ni ricevis la jenan tekston. Li amike petis, ke ni publikigu ĝin kiel dankon al la brazila Esperantistaro. Ni decidis konsenti pri lia peto, kvankam temas pri iom persona travivaĵo. Ni tamen komprenas, ke tiaj personaj travivaĵoj bone montras, ke malgraŭ opinioj, de tempo al tempo trovataj inter la samideanoj - ke Esperanto estu “nur lingvo” – ne konfirmiĝas en la ĉiutaga vivo. Ni konservas nian impreson, ke la interna ideo de Esperanto plu viglas kaj manifestiĝas per tiaj kortuŝaj okazaĵoj. Legu vi mem:

DANKON, SAMIDEANO!

En Recife, ĉefurbo de la brazila ŝtato Pernambuko, loĝas tre bela familio Esperantista, kiu dum la pasinta jaro 2013 montris solidarecon kaj malavaran sintenon, helpante kuban studentinon, kiu alflugis tiun urbon scipovante la portugalan lingvon elementamane kaj nenion konante pri tiu loko, ĝiaj kutimoj kaj moroj, ktp.

Post la unuaj semajnoj tiu brazila familio kaj la kuba knabino

iĝis praktike gefamilianoj. S-ro Advalk Paŭlo Ferreira, lia edzino Margarida, iliaj filinoj Clarissa kaj Sara eniris en la Dayana-vivon intense, ili kelkfoje promenadis tra la turista mondfama urbo, vizitis kinejojn kaj aliajn kulturlokojn, praktikadis la portugalan por ke ŝi plibonigu ĝin.

Fore, en la kuba insulo, la vera Dayana-familio, post kiam ĝi ekscias, ke ŝi trovis tre bonajn personojn en Brazilo, estis kaj estas pli trankvila kaj fidplena. Ĝi scias, ke en Recife brazilaj gebaptopatroj prizorgas ŝin.

S-ro Advalk Paŭlo Ferreira estas 40-jara aktivulo ĉe Pernambuka Esperanto-Asocio. Li, interalie, respondecas pri la asocia retpaĝaro. *Dayana Montero Rodriguez* estas 26-jaraĝa mikrobiologo, kiu ricevis stipendion pasintjare por studi en la **Federacia Universitato de Pernambuko** dum du jaroj. Ŝi magistriĝas pri fako de mikrobiologio. Ŝi ne estas esperantistino, sed ŝia patro, jes.

Juan Carlos

RECENZETO



P.S. Viana



Trevor Steele

LEGINDA AŬSTRALIAĴO

Trevor Steele jam markis sian nomon en la Esperantan literaturon. Kaj meritoplene. La aŭtoro de “...sed nur fragmento”, unu el la plej bonaj romanoj originale verkita en nia lingvo, estas ja talentulo. En la jaro 2012, Flandra Esperanto-Ligo regalas la publikon per unu plia bonega libro de la aŭstralia aŭtoro. Temas pri “Paradizo Ŝtelita”. La pli ol 300-paĝa romano, verkita per agrabla, flua, natura lingvaĵo, legiĝas facile kaj plezure. Krome, ĝi plenumas la ĉefan devon de bona romano: ĝi estas pensiga, emociiga kaj multfaceta.

Homfiguroj estas vivece konstruitaj, tiel ke oni preskaŭ “vidas” ilin. Nenio aspektas artefarite. Homaj paradoksoj kaj kontraŭdiroj estas realece montritaj, kaj la leganto ne estas kondukata al maniĥeisma maniero alfronti la tragikan historion. La centra temo estas la formurdado de la aborigena aŭstralia indiĝenaro, fare de la britaj koloniintoj. Ni, latinamerikanoj, kutimas bedaŭri la genocidon de niaj indianoj, sed

ne senprave niaj amikoj el Aŭstralio asertas, ke “ilia” genocido estis eĉ pli horora. Kaj ili havas fortan argumenton: en Ameriko restis ankoraŭ parteto el la indiĝena loĝantaro. En Aŭstralio ili estis praktike tute ekstermitaj.

Esperantistoj rajtas fieri pri ĉi tiu libro de Trevor Steele. Krom bela artaĵo, ĝi estas serioza kontribuo al la ideo, ke la homaro devas flegi kaj plibonigi sian homecon. En tempo, kiam tiom da krueleco ankoraŭ viktimitigas tiom da homoj sur nia mondo, estas grava kontribuo montri la pasintecon kaj la terurajn konsekvencojn de nia manko de homeco. Ne temas pri la britaj koloniintoj, temas pri la homaro. Alivorte, estas jam tempo, ke ni homoj konsciu, ke ne ekzistas superaj kaj malsuperaj rasoj, kaj ke eĉ la koncepto pri raso estas io science superita.

Unuvorte, “Paradizo Ŝtelita”, de Trevor Steele, estas nepre leginda libro.

**AERĴ ESTAS NIA!
ALIĜU!**

IOM DA SCIENCO

1. ĈU ANTIBIOTIKOJ RILATAS AL OBEZECO?

Ĉiuj scias, ke la mondo trapasas epidemion de obezeco: unu triono el la monda loĝantaro havas tropezan korpon. Kompreneble, nesanaĵoj manĝo-kutimoj kaj manko de korpekzercoj estas konataj kaŭzoj. Sed ĉu tio sufiĉas por klarigi tiun tragikan fenomenon?

Lastatempe, sciencistoj konjektas, ke troa, senkriteria uzado de antibiotikoj influas la aferon. Tiu konjekto de-venas de klara observo: se antibiotikoj pligrasigas bestojn, kial ne homojn? Eksperimentoj montris, ke musidoj nutrataj kun aldono de antibiotikoj al la dieto fariĝas multe pli grasaj – kaj tio konfirmas la samon, kion oni vidas ĉe aliaj bestoj. Ĉar nuntempe homidoj amase ricevas antibiotikojn, fortiĝas suspekto, ke la samo okazas al ili.

La klarigo estas simpla: antibiotikoj modifas la konsiston de bakterioj, kiuj nature vivas en la homa intesto – kaj estas tre gravaj por la digestado de nutraĵoj. Ŝanĝo en tia bakteria flaŭro eble influas la

ensorbadon de nutraĵoj dum multaj jaroj poste.

Kompreneble, tio ne signifas, ke la homaro devas radikale flankenlasi antibiotikojn, kiuj estas unu el la plej gravaj atingoj de medicino. Ĝi signifas, ke eble kuracistoj devus uzii pli strik-tajn kriteriojn por preskribado de tiaj medikamentoj.

.....

2. TRO PURAJ BEBOJ SUFERAS PLI OFTE DE ALERGIO

Neniu prudenta homo povus nei la gravecon de higieno. Sed eĉ rilate al higieno, troigoj estas danĝeraj. Sciencis-toj malkovris, ke beboj, kiuj kontaktas kun malpuraĵoj dum la unuaj jaroj de sia vivo, suferas malpli ofte de alergiaz malsanoj. Tio okazas, se la lokoj, kie vivas tiuj beboj, enhavas bakteriojn, fekrestaĵojn kaj harojn de hejmbestoj (katoj, ekzemple). Supozeble, la imun-sistemo de tiuj beboj frue en la vivo ekfunkcias pli efike. Beboj tro protek-titaj de tiaj malpuraĵoj ekhavis alergion trioble pli ofte.



FUTBALO



Carlos Correa Filho

(La ĉi-suban artikolon nia amiko Carlos Correa Filho sendis en la unuaj tagoj de la monato junio 2014, do kelkajn tagojn antaŭ la komenco de la Monda Futbalkonkuro en Brazilo. Estus interese relegi ĝin post tiu grandega evento.)

ĈU BRAZILLO FIASKO OKAZE DE SIA GRANDA EVENTO?

La 20-a Vira Futbala Mondpokalo okazos en Brazilo en 2014, sed tio ne plaĉas al ĉiuj brazilanoj. La argumentoj de iuj, kiuj ne aprobas la eventon, povas esti resumitaj en du punktoj: Unue, ĉi tiu evento permesas parlamentanojn, kiuj estas ŝtelistoj, ŝteli per tro altaj fakturadoj por la konstruo de la stadiono, ĉar la lando ne havas ilin novaj kaj modernaj. La entreprenoj ankaŭ malfruiĝas la konstruadon por devigi la registaron doni al ili pli da mono. Tio estas mono pagata de la brazilanoj per ties impostoj.

Hodiaŭ, la elspezoj por tia konstruado estas 66 procentojn pli altaj ol la buĝeto de la jaro 2010-a (285 procentojn pli altaj ol la buĝeto de la jaro 2007-a), kvankam estas senlaboruloj, kiuj loĝas en rubdeponejoj kaj manĝas rubaĵojn. La nunaj elspezoj estas proksimume 8 miliardoj da realoj aŭ 3,5 miliardoj da dolaroj!

La dua motivo estas, ke la plimulto de la brazilanoj ne parolas aliajn lingvojn ol la portugalan lingvon. La plej alta brazila leĝo pri edukado, nome

LDB (leĝo pri gvidlinioj kaj bazoj de la brazila edukado), devigas la brazilanojn lerni alian eksterlandan lingvon krom la patruja lingvo. Tiu lingvo estas la angla. Nu, la gelernantoj lernas tiun lingvon dum 9 jaroj kaj ili eĉ ne kapablas paroli ĝin. Nur malplimulto el la personoj estas pretaj laŭ lingvokono por ricevi eksterajn vizitantojn dum la Mondpokalo.

Aliflanke, estas konate, ke la brazilanoj gastigas siajn vizitantojn bone. Tiel bone, ke laŭ raporto de la turisma ministerio, tri kvaronoj de la vizitantoj deziras reveni al Brazilo. Ĉi-jare okazos grandaj festoj en la urboj kaj la Mondpokalo estos speciala momento por prezenti la turisman potencialon de la lando al la eksterlandanoj. La brazilanoj devas labori por pligrandigi siajn eblojn ricevi grandajn eventojn kaj montri al la mondo: "Tio, kio estas la plej bona en la lando, estas la brazilanoj mem"(1).

(1) Tiu slogano estis kreita de la Brazila Registaro en 2004 por plialtigi la memfidon de la brazilanoj.

**AERĴ BEZONAS VIAN HELPON!
ANIĜU TUJ!**

IOM DA POEZIO



Adélia Prado

Adélia Prado naskiĝis en la urbo Divinópolis, ŝtato Minas Gerais, en la jaro 1935. Ŝi diplomiĝis kiel instruistino en mezgrada lernejo, poste en fakultato pri filozofio. Kvankam ŝia poezia talento montriĝis jam en junaĝo, tamen ŝi publikigis sian unuan poemaron (“Bagaĝo”) en 1973, laŭ instigo de la konataj aŭtoroj Affonso Romano de Sant’Anna kaj Carlos Drummond de Andrade. Poste ŝi verkis diversajn aliajn librojn, kaj nuntempe oni konsideras ŝin unu el la plej gravaj poetoj en Brazilo. Antaŭ nelonge, ŝi ricevis la premion “The Griffin Trust for Excellence in Poetry Lifetime Recognition Award” – unu el la plej gravaj literaturaj premioj en la mondo.

IMPRESSIONISTA

Uma ocasião,
meu pai pintou a casa toda
de alaranjado brilhante.
Por muito tempo moramos numa casa,
como ele mesmo dizia,
constantemente amanhecendo.

AMOR VIOLETA

O amor me fere é debaixo do braço,
de um vão entre as costelas.
Atinge o meu coração é por esta via
inclinada.
Eu ponho o amor no pilão com cinza
e grão de roxo e soco. Macero ele,
faço dele cataplasma
e ponho sobre a ferida.

ARTEFATO NIPÔNICO

A borboleta pousada
ou é Deus
ou é nada.

IMPRESIONISMA

Foje,
mia patro farbigis la tutan domon
per hela oranĝkoloro.
Dum longa tempo ni loĝis en domo,
kiel li mem kutime diradis,
en konstanta mateniĝo.

VIOLA AMO

La amo vundas min sub la brako,
ĉe breĉo inter ripoj.
Ĝi trafas mian koron laŭ tiu klina vojo.
Mi metas la amon en la pistujon kun cindro
kaj grajno el violo kaj mi frapas. Mi pistas
ĝin,
mi faras per ĝi kataplasmon
kaj ĝin metas sur la vundon.

JAPANA ARTEFAKTO

Staranta papilio
aŭ estas Dio
aŭ nenio.

